(vidu notojn sube)

## Listo

Skribindaj/tradukindaj artikoloj rilataj al Esperanto en naciaj lingvoj

1. Esperanto
2. Rilataj al LS/lando
    a. Pri LS mem
    b. e-aranĝoj kiuj okazis/okazas/okazos en lando aŭ okazigataj per LS
    c. Muzikgrupoj
    d. Esperanto-grupoj en diversaj urboj/vilaĝoj
3. Rilataj al TEJO k (junulara-)movado
    a. TEJO
    b. IJK, plej proksima IJK kaj ĵus pasinta kaj la sekva
    c. Muzaiko
    d. Pasporta Servo
    e. Raporto Grin
4. Gravaj personoj rilataj al Eo (https://eo.wikipedia.org/wiki/Projekto:Viza%C4%9Doj)
    a. Lev Tolstoj
    b. Johano Paŭlo la 2-a
    c. Reinhard Selten
    d. laŭ la komento de JAV: http://www.liberafolio.org/2014/filipinaj-esperantistoj-en-parado-de-geja-fiero#1413895422912652 "la esperanta fakasocio Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, estas la plej frue fondita internacia organizaĵo tiukampa (1977)" - tio laŭ mi same menciindas en la rilataj artikoloj
5. Okazaĵoj rilataj al Eo

En Esperanto:

1. Organizoj al kiuj apartenas LS (ekz. konsilo de junularaj organizoj)

## Notoj

Estas du problemoj, kiujn ni evitu:

1. "cross wiki spam" - Vikipediistoj rimarkas kiam iu konkreta artikolo / artikolaro subite aperas en pluraj Vikipedioj (precipe se temas pri novaj kontribuantoj) kaj emas ilin forigadi pro supozo pri troa reklamado
    ○ Tion (eble) eblus solvi per oficialigo de tiu tradukado kiel kunlabora projekto ELiSo / TEJO kun multlingvaj priskriboj en kunordiga paĝo kaj eble alvoko al prijuĝaj rimarkoj.
2. menciindeco - artikoloj en Vikipedio devas esti pri sufiĉe "enciklopedie menciinda" temo, aliokaze minacas ilia forigo (ekz. artikolo pri SES estis forigita de la pola Vikipedio, sed

restis en la germana). Ankaŭ ne eblas argumenti, ke tiu temo estas prezentita en al Esperanta Vikipedio, ĉar sojlo de menciindeco en Esperanta Vikipedio estas ege malalta. Kaj kiam estas akuzo pri transvikia spamado, ankaŭ ne eblas diri, ke la artikolo estas en multaj vikipedioj.

  - bonas aldonadi precipe (nur?) artikolojn, pri kiuj ni certas, ke la temo estas grava por la koncerna lingvo, kiel baza indiko povas servi kvanto kaj graveco de mencioj en tiu-lingvaj komunikiloj pri la temo

3. konflikto de interesoj - kiam homo verkas artikolon pri projekto / LS / aranĝo al kiu li forte rilatas
   - bonas (almenaŭ por komenco), ke homoj verku pri aferoj al kiuj ili ne tre forte rilatas
   - spertuloj kun sufiĉo da singardo povas verki ankaŭ pri tiaj temoj, sed tiuokaze indas mencii sian rilaton al la temo (por ke loka vikipedia komunumo certu, ke interesoj de Vikipedio estas por kontribuanto pli gravaj ol liaj propraj interesoj)

## Nuna plano

Pri la artikolo "Esperanto"

1) Marek Blahuŝ (kaj KuboF?) ĝisdatigos skeman artikolon _pri_ Esperanto _en_ Esperanto kaj enmetos ĝin en tradukejon (de E@I)
2) TEJO / ELiSo trovos homojn por tradukia la artikolon en la Tradukejo
3) TEJO / UEA / ELiSo trovos homojn por adapti ĝin por loka publiko
4) ELiSo trovos homojn por enmeti la artikolojn en unuopajn Vikipediojn (aŭ tion faros mem)
   a) laŭbezone estos diskutoj pri kunigo aŭ anstataŭigo

Pri ĉiuj restantaj artikoloj

1) TEJO / ELiSo faros detalan liston da artikoloj pri Esperanto, kiuj iam devas esti en Vikipedioj
2) kontroli kio jam estas en Vikipedio (ĉu Esperanta, ĉu alilingva)
3) ĉu artikolo estas en Esperanta Vikipedio?
   a) jes
      i) ELiSo prizorgos homojn por plibonigi artikolojn por tradukado (enciklopedieco, referencoj ktp)
   b) ne, sed estas en alilingva Vikipedio (aŭ alia fonto)
      i) iu (kiu?) tradukos ĝin al Esperanta Vikipedio
      ii) se estos bezonata liberigo, ELiSo helpos pri liberigo
   c) artikoloj, kiuj dume ne estas en Vikipedio
      i) iu (kiu?) verkos la artikolon aŭ almenaŭ ties bazon kaj ELiSo ĝin enciklopediigos
4) ELiSo prizorgos homojn por kontroli taŭgecon de artikolo (precipe aŭtoraj rajtoj, enciklopedieca stilo, referencoj) kaj plibonigos la artikolojn laŭe

5) estos kreita “listo de artikoloj pretaj por traduko”
6) TEJO / ELiSo varbos tradukantojn
7) artikolo estos enmetita en nacilingvan Vikipedion
    a) tion (espereble) faros tradukanto mem
    b) se ne, ELiSo trovos homoj por enmeti la artikolon

Mencioj pri Esperanto en ne-esperanta artikolo

1. TEJO / ELiSo kolektos lokojn (en artikoloj), kie Esperanto estas menciita (ekz. Lev Tolstoj), kaj en kiuj lingvoj
    a. se mencio estas nacilingva, estos liverita almenaŭ baza traduko (en Esperanto)
2. TEJO / ELiSo plibonigos (per aldonoj - kio jam mankas en punkto 1) la liston
3. (kaj simile kiel supre ekde 3)

Intertempe

- ELiSo (KuboF) kreos informan paĝon pri la projekto en Meta-Vikio
- laŭbezone estos informita kaj varbata larĝa Vikimedia komunumo
- laŭbezone estas projekta paĝo tradukita

Tiu paĝo funkcios dum enmetado de artikolo en nacilingva Vikipedio, por ke klaru, ke ĝi estas parto de _transvikia projekto_ kaj ne _transvikia spamado_

TEJO (Piotr) kreos kunlaborilon per Trello